3-a Jaro. N-o 141 APERAS



SEMAJNE 11. Junio 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

KURAĜEGA SENNACIIGULO

"Estu trankvilaj, ne timu pri mi, morgaŭ vespere mi estos en Parizo."

Tiel parolis en Nov-Jorko la nuntempe plej fama homo. Kaj okazis kiel dirite: la 6000 kilometroj, kiuj apartigas la du ĉefurbojn, estis de la "frenezulo-fluganto" Ch. A. Lindbergh traflugataj dum 33 horoj kaj 20 minutoj.

Tiu kuraĝega junulo kredeble ne estas sennaciano, nek eĉ internaciisto; tamen estas por ni klare, ke lia heroa flugado trans la Atlantikan Oceanon forte antaŭenpuŝas la historian proceson, kiu sennaciigas nian planedon.

La teknika progreso antaŭeniras grandpaŝe.

Antaŭ nur 30 jaroj, la franca Akademio de l'sciencoj pedante deklaris, ke estas utopiege esperi, ke maŝinoj pli pezaj ol la aero povos iam flugi.

Kelkajn jarojn poste, en 1903, la fratoj Wright (Rait) sukcesis fari 266-metran flugon. En 1909, Blériot (Blerio) transflugis la maron, de Sangatte (Francio) al Dover (Anglio). La 38-kilometra distanco estis traflugata dum 34 minutoj.

Tri jarojn poste, en 1912, Garros transflugis la Mediteraneon, de Tunis (Tunisio) al Marsala (Francio): 228 kilometrojn dum 6 horoj.

De tiu tempo rekordoj sinsekvas seninterrompe: maroj, montoj, eĉ la norda poluso estas superflugitaj de homojbirdoj.

Kaj nun la oceano ankaŭ estas venkita.

Kion pli admiri? ĉu la sciencan paciencon de la teknikistoj, kiuj kreis la flugmaŝinon, ĉu la kuraĝegon de ĝia kondukisto?

La popolamaso kutimas ĉefe admiri la kuraĝon. Tial Lindbergh havis en Parizo nepriskribeblan akcepton. La entuziasmo estis tiom granda kaj arda, ke necesis artifike kaŝi la heroon por eviti, ke liaj admirantoj ne premsufoku lin.

Entuziasmiga estas ja la bravegeco de Lindbergh. Kiam oni prezentas al si, ke malgraŭ multe da antaŭaj akcidentoj



Ch. A. Lindbergh

mortigaj, homo tute sola havas tiom da fido al sia maŝino, tiom da sinoferemo kaj tiom da volo por entrepreni tian pioniran flugadon, oni facile komprenas, ke neniu homo povas resti indiferenta ĉe tia heroegaĵo.

Kaj jen alia esperiga fakto: la francoj estas ĝenerale treege patriotaj; tamen ili povis dum kelka tempo forgesi pri sia nacieco kaj entuziasmege aklamadi alilandan viron, kiu eĉ ne povas kompreni ilian lingvon. Ĉu tio ne pruvas, ke tiu momenta sennacieca spiritostato povas esti edukata, malvolvata kaj finfine fariĝi konstanta?

La popolamaso ne klare komprenas la grandan signifon, kiu kuŝas en tiu malgrandigo de nia planedo per senĉesa venko de la tekniko super la distanco. Ĝian entuziasmon verŝajne kaŭzas ia malklara sento, konsistanta el malpreciza espero al pli bela, pli bona estonteco.

Sed ni, sennacianoj, povas plenkonscie kaj varmege saluti la heroecon de Ch. A. Lindbergh. Li ja, senkonscie eble, sed treege trafe, helpas al ni proksimiĝi al la malproksima celo.

Ni estu optimistaj; ni havu la certecon, ke la scienco, la tekniko, la kuraĝo, la ŝtala volo de homoj fordetruos la stultan patriotismon, disrompos la anakronismajn landlimojn kaj unuecigos la mondon.

Vivu do la tekniko! Vivu Lindbergh, la kuraĝega sennaciigulo. *E. Lanty.*



TAGO EL MIA VIVO

Jen ankoraŭ unu instruplena "tago". La K-dino, kies vivmaniero estas ĉi sube priskribita, scipovis tiel aranĝi sian vivon, ke malgraŭ la laciga panakira laboro ŝi ĝuas dum sia libera tempo la plezurojn raciajn kaj nobligantajn la spiriton. Sporto, muziko, legado kaj promenadoj montaraj, — ĉu tio ne estas preferinda ol "fokstrotado", kartoludado, drinkado kaj aliaj similaj amuzmanieroj de l' burĝaro?...

Mi estas dudeksepjara aŭstria laboristino en la ŝtata tabakfabriko en Hallein, industria urbeto kun ok mil loĝantoj.

Nia urbeto troviĝas meze de montaro en Salzach-valo (distrikto Salzburg) kaj havas tre belan ĉirkaŭaĵon. La fabriko en kiu mi laboras, staras ekstere de la urbeto.

Matene je la 6-a mi devas rapide elलitiĝi, trinki kafon, ĉar je 6.45 h. fajfas jam unuafoje la fabrika fajfilo. Je la 7-a mi devas jam esti en la fabriko, ĉar tiam la fajfilo ree fajfas kaj samtempe la pordego de la fabriko estas fermata... Ve al malfruiĝintoj!

Mi surmetas blankan laborveston, kiu estas blanka nur tre malofte: oni ŝanĝas ĝin nur ĉiukvarsemajne kaj rapide ĝi tute



K-dino 2019 sur rivero Salzach.— Per kruco estas montrita la fabriko, en kiu ŝi laboras.

bruniĝas pro tabakpolvo. Tiu venena polvo brunigas ankaŭ la vizaĝhaŭton, ĝi estas enspirata grandkvante kaj estigas kronikan pulmokataron.

Ĉe ĉiu tablo sidas dekdu laboristinoj do sume en nia salonego laboras 156 personoj. Ĉiutage ni laboras ok horojn, sabate nur 4 (ĉar posttagmeze ni tiam estas liberaj). Antaŭtagmeze venas la direktoro kun oficisto de mia fako kaj ili ekzamenas la produktadon: ĉu la cigaroj estas belaj, ne tro longaj, dikaj kaj pezaj. Ni faras la cigarojn sen helpo de maŝinoj, nur premilon kaj tranĉilon ni uzas. Mi devas fari 300 pecojn tage, 1700 semajne. Kiu ne povas fari tiom multe, estas malpli bone pagata. Je la 11-a mi iras hejmen por tagmanĝi kaj mi estas libera ĝis la 13-a. Intertempe mi laboras hejme en ĝardeno: ĉiun minuton mi uzas por esti en freŝa aero. De la 13-a ĝis la 17-a denove la sama laboro. Tiel tagoj sekvas tagojn, semajnoj-semajnojn, la jarojn-jaroj: Malofte kanto aŭ mallonga interparolado rompas la unutonecon...

Post la vespermanĝo mi kudras aŭ brodas, unuhore muzikas, legas aŭ vizitas sindikatan kunvenon. Ĉiulunde mi partoprenas kurson pri unua helpo en la montaraj akcidentoj. Merkrede mi gimnastikas. Inter la 9-a kaj la 10-a mi kutime enlitiĝas.

Sabate posttagmeze kaj dimanĉe mi estas libera. Tio estas mia plej bela tempo. Tiam rapide enpakinte dorsosakon, mi iras for en la montaron, somere piede, vintre per skio. Tiuj promenadoj plibeligas, heligas, valorigas la vivon. Ĉi tie, malsupre estas batalo, tie regas trankvilo kaj paco.


Kinematografejon mi vizitas nur kiam estas montrata scienca aŭ sporta filmo.

SAT-anino 2019.



EL HUNGARIO

Post la per-terora elektado en januaro kunsidis la hungara parlamento. Granda parado estis aranĝita. Inter la novaj parlamentanoj tre multaj estas pastroj, koloneloj ktp. Kaj dum tiu ĉi tago estis arestitaj ĉ. 300 Gek-doj el tiuj, kiuj havis la kuraĝon protesti kontraŭ la nova parlamento. Inter la plej unuaj decidoj de la parlamento estis la permeso al la polico aĉeti 12 kirasaŭtomobilojn, kiuj tre bone utilas en strataj bataloj kontraŭ la ĉiam ribelanta Proletaro...



Sed malgraŭ la grandega persekutado la hungaria Proletaro marŝas sur la revolucia klasbatala vojo, tion pruvas la konstanta subtera (sekreta) komunista movado, kiu ĉiam pli kaj pli fortiĝas. Nur antaŭ 18 monatoj okazis la malkovro de la "Rakoŝi" komunista movado kaj la *29. 2. 27* nova malkovro okazis. La polico kaptis 53 Gek-dojn, kiuj laŭ asertoj de la polico preparis revolucion kontraŭ la nuna reĝimo; inter ili estas K-doj Zoltano Szanto (legu Santo) kiu jam dum la hungaria proletara diktatorado ludis gravan rolon, poste K-do Vagi la gvidanto de la Socialista Laborista Partio. Same ne povas forresti elinter ili la esperanton parolantaj Gek-doj nome K-do G. Toth kaj K-dino Borinjo Szeremi (Legu Seremi) ambaŭ SAT-anoj.

Post terura inkvizicio la prokuroro starigis 31 K-dojn antaŭ la militistan juĝistaron, kiu povas decidi nur mortkondamnon aŭ la deklaron de sia nekompetenteco pri la afero; la juĝado devas okazi dum tri tagoj. Tiu ĉi proceso okazis la 12-an de aprilo. La klasjuĝistaro per ĉiu maniero volis pendigi la K-dojn. Sed la tutmonda Proletaro per sia solidareco denove savis la vivon de la K-doj. Post unutaga proceso, kie la K-doj kuraĝe esprimis siajn revoluciajn opiniojn la "sango"-juĝistaro deklaris sian nekompetentecon pri la afero, sekve la tuta afero estis transdonita al la ordinara juĝistaro.

Dum la lastaj semajnoj la ministro prezidanto Bethlen vizitis sian samfakanon Mussolini en Italio. Ili gravajn kontraktojn faris, kiuj koncernas la proksiman estonton de ambaŭ landoj.

La Laboristaro, kiel en ĉiuj kapitalistaj landoj, en granda mizero vivas; por pruvi la mizeron sufiĉas ke ni citu tion, ke en tiu ĉi landeto ekzistas pli ol 75 karteloj, kiuj diktas la prezojn de la plej necesaj nutraĵoj kaj bezonaĵoj. Nature la kapitalistoj ĉiam plendadas, ke ili nur malprofitas, sed la bilancoj de la plej diversaj entreprenoj la kontraŭon montras. Ekzemple naŭ grandaj bankoj dum la jaro 1926 havis puran profiton de 17 000 000 pengoj[1]).

Inter la gravaj registaraj zorgoj nuntempe krom la laboristarpersekutado estas la formortiĝo de la hungaria popolo. Tiu ĉi afero estas, ĉiam pli kaj pli aktuala, ĉar la mizeranta popolo ĉiamaniere klopodas malhelpi la naskiĝon de novaj idoj. Malgraŭ la severaj punoj eĉ la vilaĝanoj faras ĉion por eviti la gravediĝon. La statistikistoj jam vekriadas pro la malpliiĝo de la popolo, sed la registaro anstataŭ sanaj laboristaj loĝejoj, kuracejoj kaj ripozdomoj nur karcerojn kaj templojn konstruigas.

La hungaria Proletaro, kiu jam foje havis la potencon, sindoneme ĉion oferante batalas por la nova proletara diktatorado. *(233. 466.)*



Letero el San Cristobal

Unu el la libroj de mia juneco, kies enhavo plej longe restadas en mia memoro, estas "Robinson Crusoe" de Defo. R. C., estis maristo, kiu sola dum kelkaj jaroj restadis sur insuleto San Fernandez en la Silenta Maro. Mi memoras, ke mi kiel knabeto sopiregis vojaĝi tien kaj travivi similajn aventurojn kiel mia heroo de la libro, kaj nun preskaŭ hazarde mia juneca revo efektiviĝis.

Dum kelkaj monatoj mi jam restadas sur la insuleto San Cristobal en la Silenta Maro. San Cristobal (0° 39' N — 1° 37' S) havas lokon en la insulargrupo Arcipelago de Colon, kiu sume areas 7640 km² kaj apartenas al la respubliko Ecuador (sektoro *32*).

La insulargrupon malkovris hispaniaj maristoj en la deksesa jarcento kaj ĝis la deknaŭa ĝi estis libera loko por mar-

[1]) 1 dolaro = 5,70 pengoj.

rabistoj kaj diversspecaj aventuristoj. En 1832 generalo Villamil starigis ecuadoran flagon tie kaj aneksis ĝin por la ecuadora respubliko.

En 1835 la fame konata sciencisto Darwin restadis tie kaj kolektis materialon por sia mondkonata verko: "La deveno de la gentoj".

Tiam la enloĝantoj nombris proksimume 300 homojn, kiuj sin okupis per terkulturado kaj bestbredado.

Nun, cent jarojn poste, troviĝas sur la insularo sume proksimume 500 homoj. Malgranda nombro rilate la grandan areon.

Dum la lastaj 3 jaroj estas senditaj el Norvegio 3 ekspedicioj por koloniigi la insularon, sed ili malsukcesis. Malgraŭ tre favora klimato kaj eterna somero, la tero ne estas fruktodona, ĉar regas tie troa sekeco.

Sur San Cristobal loĝas nun ĉ. 350 geviroj, kreolaj, indiĝenaj kaj norvegianoj.

La insulo posedas grandbieniston A., kiu ŝajne ankaŭ posedas la homojn. En liaj plantaĵoj kreskas bananoj, citronoj, oranĝoj, kafoarboj, sukerkanoj kaj kelkaj aliaj negravaj tropikaj kreskaĵoj. Kelkaj miloj da duonsovaĝaj dombestoj paŝtadas libere ĉirkaŭe. Por 8-hora labortago sinjoro A. pagas al siaj laboristoj 1,30 sucre (0,30 dolaro) kaj sekve liaj laborantoj, parte diligentaj homoj vivas mizere.

La bienposedanto posedas la solan vendejon de manĝaĵoj kaj fiksas mem, sen ia ajn kontrolo, la prezojn sufiĉe karajn. Li ankaŭ distilas kaj vendas "canja" (brandon) por siaj klientoj. Entute li bone zorgas, por ke la monerojn, kiujn li elspezas per unu mano, li retiru, por si mem per la alia ...

Neniu lernejo, nek preĝejo, aŭ alia organizo ekzistas. Pro ĉi tiuj malbonegaj cirkonstancoj ardas tamen la ribelo en la cetere tre afablaj homoj. En 1905 kiam la antaŭa bienposedanto C., kruela homo, kondamnis al morto 6 personojn. ribelo eksplodis. La ribelantoj senarmaj kaptis la forkurantan C. kaj senkapigis lin. En 1924 okazis la lasta ribelo en kiu 4 gardistoj de A. perdis la vivon. Sinjoro A., la nuna grandbienisto, kaj liaj ĉefaj helpantoj ĉiam portas armilojn.

La usona registaro jam de longe intencas aĉeti la insularon, por konstrui gardejon, okaze de eventuala konflikto kun Japanio, sed la aliaj grandpotencoj (Anglio, Francio k. a.) kontraŭstaras. Verŝajne Usono ĝin simple baldaŭ prenos, ĉar ĝi bezonas ĝin kiel gardejon por la Panama-kanalo. En tiu okazo verŝajne povos esti eble akiri vivrimedojn por multaj miloj da homoj. Ĉar la insularo ĝis nun estas zorgata de senpova respubliko Ecuador, la enloĝantoj estas submetataj je ĉiama mizero.

Mi forte admonas elmigrontojn *ne* vojaĝi al Arcipelago de Colon.

M. Muribo.

Sub jugo de orkolumaj sinjoroj

(Daŭrigo[1])

Ĉu spiri oni permesas?

Alian ne malpli interesan ekzemplon donas K-do el estonia armeo. Pro lia peto ni ne mencias ĉi tie eĉ komencliterojn de lia nomo:

"Antaŭnelonge, — skribas la K-do, — unu soldato, forirante el necesejo, forgesis butonomi la butonon ĉe pantalono kaj tiel enviciĝis. Pro tio oni devigis lin 4 horojn stari senmove, tenante la pafilon sur ŝultro permane".

"En nia armeo estas malpermesite legi socialistan ĵurnalon 'Jukendus'. Aboni persone ian ĵurnalon estas malpermesite. Paroli pri politiko estas malpermesite. Kunveni pli ol triope en la kazerno por interparolo estas malpermesite. Pliperfektiĝi en esperanto, studante ĝin en kazerno, oni al mi malpermesis."



Pro la patrio

Husaro Bolog

Kiel punas la registaro kaj "orkolumaj sinjoroj" tiujn, kiuj ne volas subiĝi al brutecsevera armea disciplino vidas el malgranda historio pri hungara husaro Bolog.

"Bolog havis maljunan patrinon kaj etan terpecon, kiun la maljunulino ne povis kulturi. Kiam venis somera tempo de kamplaboroj, li petis, ke oni permesu al li almenaŭ por unu semajno viziti sian vilaĝon, por kulturi teron kaj garantii la patrinon de almozuliniĝo. 'Oni' malpermesis".

"Bolog longe pensis kaj finfine decidis forkuri. Kiam la oficiro eksciis pri la forkuro, li komisiis unu suboficiron kun 8 soldatoj rajdi al vilaĝo de Bolog, aresti kaj alvenigi lin. Atinginte Bolog'on, la suboficiro volis mortigi lin per hufoj de ĉevalo, sed Bolog sukcesis elturniĝi. Suboficiro pafis el revolvero, sed maltrafis. Kolerigita, li ordonis al husaroj rajdi reen, pelante Bolog'on antaŭ si. Ĉe duonvojo laciĝinta Bolog petis ke oni haltu, por ripozi kelkajn minutojn. Responde suboficiro ordonis: 'galope!', la husaroj ekgalopis, kurigante antaŭ si la malfeliĉulon ..."

"Bolog kuris ... unu kilometron ... unu kun duono ... ĉe la dua kilometro li falis teren senviva ..."

Laŭ sciigo de K-do B. B., kiu skribis pri tio, la suboficiro ne estis punita kaj eĉ ricevis monpremion "pro kapto de danĝera krimulo."

Senkulpaj viktimoj

Germana SAT-ano, vizitinta Rumanion, priskribas jene terurajn faktojn kaj ciferojn pri punoj en rumana armeo:

"Ne mi sola skribas pri tio. Viena ĵurnalo "*Neue Freie Presse*" ankaŭ sciigas, ke aŭtune de 1925 en Okno estis mortpafitaj 16 kaj kondamnitaj al longa malliberigo 40 soldatoj, suspektitaj pri "revolucia agado". En Kiŝinev dum unu jaro estis mortpafitaj 45 militistoj (inter ili 1 oficiro), en Germannŝtadt — 44 soldatoj kaj 3 oficiroj. Soldatoj de Bukovina regimento, senditaj por subigi ribelon de Bessarabiaj kamparanoj, rifuzis pafi kamparanojn kaj elĵetis armilojn el fenestroj de vagonoj. Pro tio ĉiu deka soldato estis tuj mortpafita de oficiroj kaj aliaj estis juĝitaj de militjuĝo, kiu kondamnis al mortpuno ankoraŭ 38 soldatojn."

"En militistmalliberejoj de rumana armeo ekzistas jenaj punoj: vergado, iafoje per *saligitaj* (!) vergoj, kaj pendigo al plafono je manoj."

(Daŭrigota.)

[1]) Komencon vidu en n-o 129 de "S-ulo".

La sindikata leĝprojekto de la brita kapitalista registaro

La Industriaj Disputoj kaj Sindikata Leĝprojekto (Trade Disputes kaj Trade Unions Bill) kaŭzis indignon kaj protestojn tra la tuta brita laborista movado. Tio pli unuigas la labor-klason ol multaj kongresoj. Ne necesas miri pri tiu fakto, ĉar la projekto minacas la bazon mem de laborista industria kaj politika povo.

La projekto diras, ke ĉiu ĝenerala aŭ solidareca striko estas kontraŭ-leĝa se ĝia celo estas devigi la registaron aŭ suferigi parton de la popolo. La juĝistaro decidas ĉu difinita striko estas en tia kategorio aŭ ne, sed prokuroro aŭ alia persono povas peti leĝordonon por malebligi la strikon ĝis la juĝistaro faros decidon pri ĝi. Ĉi tio signifas, ke antaŭ ol striko povas komenci la sindikato eble devas atendi decidon de la juĝistaro. La dua parto protektas la renegaton kontraŭ monpuno aŭ forpelo el la sindikato. Vere ĝi estas nomita, "La Leĝo de la Renegatoj". La tria parto celas protekti lin dum la ago de perfido mem. Parto kvara koncernas la politikan monkason de la sindikatoj. Ĝis nun, se membro *ne ŝatis* pagi al la politika kaso, li devis subskribi dokumenton; la projekto renversas la aferon kaj ĉiu membroj devas subskribi dokumenton se li *deziras* pagi al la kaso. Oni esperas malplenigi la politikan kason malfaciligante la kolektadon de la mono. Parto kvin penas izoli la ŝtatoficistojn. Ili ne povos mem aliĝi sindikaton, se ĝi estas filio de la Sindikata Konferenco (Trades Union Congress) aŭ se la sindikato ne estas sole por ŝtatoficistoj. Parto ses diras, ke urba konsilantaro ne povas postuli de siaj laboristoj, ke ili aliĝu sindikaton.

Konsiderante la kaŭzojn de la enkonduko de l' projekto ni nature pensas unue pri la ĝenerala striko 1926. Sed fakte tiu striko nur estas simptomo de pli granda antagonismo de la klasoj en Britio.

Kiam Anglio estis la ĉefproduktejo de la mondo, la kapitalista klaso povis esti iomete malavara. La laboristoj rajtis eĉ sendi kelkajn homojn al parlamento. Oni ne pensis, ke la sindikatoj kaj la laborpartio iĝos tiel fortaj. La granda milito aliigis la aferon. Britio devis cedi al Usono sian bonan pozicion en la mondkomerco. En la konkuro por vendlokoj la kapitalistoj deziris malaltigi la prezojn de la komercaĵoj. Por fari tion, ili atakis la salajrojn de la laboristoj. La karba industrio estis la baza industrio kaj pro tio ili atakis unue la karbministojn kaj sukcesis, ĉar la brita Proletaro ne estis sufiĉe unuigita. Sed la ĝenerala striko preskaŭ sukcesis kaj la kapitalista klaso timas similan manifestacion de proleta solidareco. Eble ĝi sukcesos! Estas ankaŭ la timo de revolucio, kiu estas inkubo de kelkaj el niaj "tory gentlemen"[1]).

La projekto certe estos aprobita de parlamento. Kion la sindikatoj faros? Ĉu nenion? Ĉu ili konsentos senlukte? Tio estus katastrofo kaj kredeble kaŭzus la finon de la sindikata movado en ĝia nuna formo. La plej bona metodo estus, ke la sindikatoj rifuzu akcepti la projekton. Tio embarasus la registaron. Se ĝi arestus personojn aŭ penus monpuni sindikatojn, ili devus tuj ordoni ĝeneralan strikon. Ĝi devus komenciĝi en ĉiuj industrioj en la sama tempo. Nur forta plano allogus la laboristojn. Kelkaj homoj konsilas, ke ni atendu ĝis la labor-partio estiĝos la plej granda partio en parlamento kaj povos elstreki la projekton el la libro de la leĝoj, sed la nuna registaro penas malebligi la venkon de la laborpartio...

London (1189).

1) Moka nomo de konservemuloj.



Ĉu Sovetio ankaŭ

Post mia artikolo "Laboristaro, malfermu la okulojn" en n-o 125-126 de "Sennaciulo", en kiu mi priskribis pligrandigon de militelspezoj en diversaj landoj, mi ricevis kelkajn leterojn kun demandoj: "Ĉu ankaŭ Sovetio ne pligrandigas militelspezojn?"

Tiun demandon mi povas respondi per jenaj oficialaj ciferoj (por la supre notita artikolo mi ankaŭ ĉerpis ciferojn el la oficialaj raportoj):

Elcento de militelspezoj el la tuta buĝeto de Sovetio estas jena:

1923—1924 jaroj 18%
1924—1925 jaroj 15%,
1925—1926 jaroj 14,5%
1926—1927 jaroj 13,7%

Kaj el tiu ĉi buĝeto estis elspezita por vivo de l' armeo (nutrado kaj vestado de ruĝarmeanoj, konstruado de kazernoj ktp.) en 1923—1924 j. 57,7% kaj en 1924—1925 j. 61,5%.

Por kulturbezonoj de ruĝarmeanoj estis elspezita en 1923—1924 j. 1,7% kaj en 1924—1925 j. 2% (en Polio por sama celo oni elspezas nur 0,5% de militbuĝeto).

Do ni vidas, ke en Sovetio: a) elcento de militbuĝeto ĉiam malpligrandiĝas kaj b) el tiu ĉi buĝeto tre malgranda parto estas elspezata por novaj armigoj kaj precipe oni elspezas por vivo de ruĝarmeanoj.

(5241.)



"La libera Saarlando!"

La regiono ĉe la "Saar" estas regata de Komisiono elektita de la Ligo de Nacioj; rezulte ni estas sendependa popolo. Sed kiel aspektas la sendependeco kaj libereco tion montras elokvente jena okazo ĉe la enterigo de socialisto. Antaŭ kelkaj tagoj, kiam oni portis socialistan "krimulon" al la tombejo, estis kunportitaj ruĝaj standardoj, kovritaj per funebra krepo. Antaŭ la pordego de la tombejo la pastro Reiners el Wahlschid ordonis ekhalti kaj alvokis la landpolicon (germane dirate "landĉasistojn") kiu staris apude preta defendi la tombejon. Ridante li diris, ke li malpermesas kunporti partistandardojn kaj kronojn ornamitajn per ruĝaj rubandoj al tia kampo (tombejo). Por ne provoki skandalon, oni lasis la flagojn kaj kronojn antaŭ la muro. Sed ne estis sufiĉe; kiam partiestrarano komencis paroladon ĉe la malfermita tombo, subite lin alvokis policisto dirante, ke li estos arestita, se li ne finos tuj la paroladon. Alia partiano metis kronon, kiel adiaŭsaluton, al la tombo, kaj alproksimiĝis alia policisto minacante malliberigis lin. Kiam oni alian tagon al tombo portis burĝon la sama pastro diris al liberpensulo, ke li estonte ne plu devas eniri tombejon. Kiam li volas viziti la tombojn de sia parencaro, li devas havi la permeson de la ekleziestraro. Tiaj agadoj de la pastro nur povis okazi, ĉar la sarlandaj tombejoj estas posedaĵo de la eklezio.

Hugo Strullmayer (7733).



Salajroj kaj vivkosto en Usono

En mezgranda urbo kiel Rockford (Illinois) kun ĉirkaŭ 80 000 loĝantoj la salajroj kaj vivkosto estas la sekvantaj:

Salajroj

Ĉarpentisto (konstruado)	1.12	dolaroj	hore
Masonistoj	1.35	„	„
Pentristoj	1.00	„	„
Lignaĵistoj (meblistoj)	0.30—0.75	„	„
Aliaj fabriklaboristoj	0.30—0.75	„	„
Helpantoj en konstrulaboro	0.50	„	„

Vivkostoj

(Prezoj de manĝaĵoj pokilograme, kiam ne estas aliel citite)

Faruno tritika blanka	11—15	cendoj
Butero	110—150	„
Kokosa butero	72	„
Viando bovspeca	45	„
Ovoj (dekduo)	25	„
Ovoj (dekduo) vintre	50	„
Rizo	20—35	„
Tomatoj (somere)	5—10	„
Tomatoj (vintre)	33—120	„
Olivoleo (politre)	110	„
Nuksoj juglandaj	88	„
Nuksoj avelaj	66	„
Nuksoj brazilaj	45	„
Lakto (politre)	11	„
Pano blanka	22	„
Margarino	55	„
Porkograso	30	„
Terpomoj	8	„
Batatoj	15	„
Karotoj	22	„
Brasiko	11	„
Bulboj	11	„
Laktuko (kapoj)	po 10	„
Bananoj	20	„
Pomoj	20	„
Oranĝoj (dekduo)	35—70	„
Piroj (dum rikolto, dekduo)	5	„
Piroj (dum alia tempo dekduo)	50—60	„

Prezoj de vestaĵoj por viroj:

Kostumo 25—60 dolaroj. — Ŝuoj 5—10 dolaroj. — Ĉemizo 1.50—5 dolaroj.

Luprezoj: 4-ĉambra etaĝo, malnovmoda 15—30 dolaroj monate. — 4-ĉambra etaĝo nova moderna (kun banejo) 40—70 dolaroj monate. — Ĉambro meblita por unu homo 2.50—6 dolaroj semajne.

Karl Fröding, Rockford-Ill.

En sovetia malliberejo

Mi kelkfoje legis en "S-ulo" pri alilandaj malliberejoj, nun mi volas rakonti kion mi eksciis hazarde pri unu sovetia malliberejo, aŭ "domo de rebonigo", kiel ili estas nun nomataj.

Unu mia konatulo H., estinta komunisto trafis sub influon de malbonaj homoj, komencis drinki kaj ĝenerale vivi malvirte. Ĝuste en tiu tempo ni disiĝis, kaj mi plu ne sciis ion pri li. Post pli ol unu jaro mi ricevis leteron de li el Moskva malliberejo.

Montriĝis ke li malŝparis 1500 rublojn da socia mono. Oni kondamnis lin je 1½ jaro. Li plendas al mi pri sia malfeliĉa sorto, pri "severa reĝimo" kaj skribas jenon:

"Kiel mi vivas? La vivo estas mallibereja, senluma. La reĝimo estas severa, oni penas nin rebonigi" (eble li ironias pri rebonigo. E. J.).

"Ĉiusemajne dum nur 2 horoj oni enlasas la vizitantojn en nian klubejon, kie ni povas tute libere interparoli senkontrole. Oni devigas nin labori 8 horojn tage kaj ne permesas maldiligenti. Nun mi laboras en kest-metiejo kaj perlaboras proksimume 50 kopekojn tage."

"Oni tre malofte forpermesas nin el malliberejo por viziti la parencojn."

"Ellitiĝas ni je 5.30 h., komencas labori je 7 h.; de la 11 ĝis 12 h. estas manĝotempo, poste ĝis la 4 h. ni denove laboras. Post la 4 h. ni estas liberaj."

"Certe, ni estas liberaj nur relative, ni povas iri al la klubejo aŭ en la bibliotekon."

Mi bedaŭras, ke li tiom malmulte skribis pri la severa reĝimo, sed mi avertas la legantojn, ke tiu homo volis min kredigi pri siaj malfeliĉaĵoj, ke li nepre plendus al mi, se ekzemple lia manĝo estus malbona aŭ se oni lin enkarcerigus ktp.

Eble kelkaj K-doj trovos tamen, ke la reĝimo estas vere severa. Por tiuj K-doj mi tradukas ankoraŭ unu fragmenton el sama letero.

"Lastan jaron mi laboris, oficis, drinkis, gaje mi vivis, ĉiam en haladzo (ebria verŝajne)".

"Mi laboris en provinco. Iafoje veturadis mi kun kolegoj en vilaĝon al geedziĝo aŭ alia festo."

"Drinkadis ni semajne, malvirtis. Kaj jen tuta vivo tiel pasis" (li estas 25-jara).

"Kaj poste subite ĉio ĉesis, oni min kaptis kaj *ámba!*"

(Amba — en krimula slango signifas — fino; katastrofo, pereo.)

Kiu el legantoj trovos, ke lia enmallibereja vivo estas pli malbona, pli malregula ol la *antaŭ*-mallibereja?

Mi persone opinias ke li dum tiu 1½ jaro kutimiĝos al laboro, saniĝos korpe, ĉar li ne estas plu venenata de alkoholo, kaj eble post liberiĝo li ne plu volos ripeti la krimon kaj fariĝos pli utila sociano, ol li estis ĝis nun.

E. Insarov (6979).

☆ DISKUTEJO ☆

Ĉia fanatikismo estas malaprobinda

(Rilate la artikolojn "Ĉu vere?" en n-o 131-132 kaj "Ne vere!" en n-o 136.)

Kun granda miro mi legis en n-o 136 la respondon al la artikolo "Ĉu vere?" (n-o 131-132). Verŝajne iu miskompreno okazis. Ĉu la demandinto aludis pri *leĝa devigo* je salutado de ruĝa flago aŭ formeto de kapvestoj dum kantado publika de la Internacio? Pri tio mi dubas! La leĝofarantoj ne estas sufiĉe mallertaj por enmeti tian stultan devigon en skribitan tekston. Ja la tempo pasis kiam tio estis ebla. Sed povas esti, ke fakte tiu devigo ekzistas, pro maltoleremo de la amaso.

Jen fakto, kiun mi certigas, ĉar mi mem ĝin vidis. — En Nancy (Francio), dum patriota festo, la muzikistoj ludis la nacian himnon kaj kelkaj ĉeestantoj bategis iun personon, kiu ne volis formeti la ĉapelon spite pluraj admonoj. Certe leĝo tion ne permesas, sed fakte la fanatikuloj ne trafis en karceron! ĉar la policistoj estis pli toleremaj al ili, ol ili mem estis al la kuraĝa liberpensulo. Tio pruvas, ke kiam homo havas ian idealon li ne kapablas kompreni (plej ofte) ke aliu havas alian. Cetere ĉu, objektive, senĉapeliĝo pruvas respekton al io ajn? Tio estas tute konvencia afero.

Mi finos per preciza demando al niaj sovetiaj K-doj "ĉu en Sovetio ne okazis, ke iu estis ĉu batata, ĉu insultata de amaso pro la kaŭzo priparolita?"

Interese estus tion scii ĉar tio pruvas, ke la sovetianoj estas, pri tiu punkto, pli bone edukataj ol la anoj de kapitalistaj landoj. Cetere, ĝeneraligo estas ankaŭ danĝera; la fakto kiun mi citis ne estus okazinta en aliaj regionoj de Francio, ĉar ja unueco de patrio je spirita vidpunkto, samkiel je politika aŭ ekonomia estas mito. Pro tio ni diru ke SAT-celoj devas esti raciaj kaj neniel ajn fanatikaj. Ni liberiĝu de ĉiuj antaŭjuĝaj premoj!

K. R.

*

Estas vere!

La K-do 55 demandis: ĉu estas vere ke en Sovetio ĉiu devas senĉapeliĝi kiam estas ludata la Internacio. Mia respondo, kiel tiu de germaniano estanta nun en Sovetio, estas: "Parte vera!"

Se estas iu kunveno kaj la muzikistaro ludas Internacion, ĉiuj stariĝas kaj demetas la ĉapelojn. Sovetiano certe respondas: "tion ili faras pro entuziasmo, pro honoro de l' Internacio, devigo ne ekzistas".

Miaj spertoj estas jenaj: Mi ĉeestis komjunulan kunvenon. Dum malfermo oni ludis la Internacion; ĉiuj stariĝas demetas la ĉapelojn, ankaŭ mi. Parolas eminenta gvidanto, post fino de lia parolado, aplaŭdo kaj denove Internacio. Ĉiuj stariĝas, demetas ĉapelojn, sed mi ne. Kial? — La laboristoj en Germanio ne kantas la Internacion kvazaŭ por aplaŭdi. Juna laboristo, apude starinta, montris al mia ĉapo, ĉar eble li pensis, ke mi forgesis demeti ĝin. Mi ne atentis lin. Venis aliu, insultante deprenis mian ĉapon kaj ĵetis teren. Intertempe finiĝis la Internacio kaj mi surmetis la ĉapelon. Parolis partigvidanto. Sekvis aplaŭdego kaj... Internacio. Mi eliris, ĉar stariĝi kaj demeti la ĉapelojn ŝajnis al mi tro burĝeca. La oftan kantadon dum la 6-a SAT-kongreso oni povis kompreni, sed tiu ofta kantado en kunvenoj ktp. certe ne estas pro entuziasmo, sed pro kutimo. Ĉu ni tiel honoras Internacion?

Leipvagulo (6309).

Por nia distro

— Pleje mi malamas inĝenierojn — inter nia kaj via vilaĝo niaj praavoj kalkulis 40 kilometrojn. Venis inĝenieroj malbenitaj kaj mezuris 90...

— Nu?

— Ni sekve devas iri nun 50 pliajn kilometrojn...

*

Konsultejon venis laboristo. Doktoro estas rapidema.

— Senvestiĝu! — Jen, doktoro...

— Senvestiĝu, estas tia ordo! — Mi, doktoro...

— Senvestiĝu, diablo vin prenu, ne ŝtelu tempon!

La laboristo tute senvestiĝis.

— Nun diru kion vi bezonas.

— Mi alveturigis por la malsanulejo hejtaĵon.

*

— Van Vanĉ nia hieraŭ tutan tagon pasigis en Kremlo; en VCIK estiś, en Sovnarkom

— Ĉu li jam gravan postenon okupas?

— Ne, kial? Plankfrotisto li estas.

*

— Paĉj', iru ni tagmanĝi.

— Kion kuiris panj'?

— Nenion.

— Nu, manĝu vi, mi iros al gastejo.

*

— Ĉu via estas tiu knabo bela?

— Jes, jes, estas mia!

— Li, kanajlo, miajn okulvitrojn per pilko rompis, do, pagu vi.

*

— Helpu kiom vi povas. Ĉio forbrulis, ĉio...

— Kaj vi havas certigilon?

— Ĝi ankaŭ forbrulis kune kun la tuta havaĵo.

*

— Van Vlasĉ, ne peku. Mi sendis al ci du kilogr. da pano aĉeti kaj ci donis nur 1½ da kilogr.

— Ne, frato, mi donis ĝuste, nur anstataŭ pezilo mi uzis dukilograman pecon da sapo, kiun mi aĉetis en cia butiko.

TRA ESPERANTIO

Kial ni bezonas programon?

Preskaŭ du jaroj pasis, depost kiam la demando de programo estis priparolita la unuan fojon en la vicoj de SAT je la kongreso de Vieno, somere 1925. En marto 1926 aperis en *Sennaciulo* (n-o 26) projekto de programo, sed de tiu tempo, la diskuto ekdormis.

Eble estas utile, ĝin revivigi antaŭ nia Lyon'a kongreso.

Antaŭ ĉio, necesas nin demandi, ĉiu ĝenerale kaj pro kio ni bezonas programon. SAT ekzistas nun jam ses jarojn sen programo, la celdeklaro en la statutoj ŝajnis plene sufiĉa. Kial do subite doni al ĝi vastan, longan programon?

Laŭ mia opinio, programo estas necesa pro diversaj kaŭzoj.

Je la fondo de SAT nia organizo estis embrio havanta kiel tuta estonto nur la bondezirojn kaj la bonan volon de siaj kreintoj. Ĝia spirito estis arda kaj konkerema, sed ĝia korpo estis malfortega. Nuntempe SAT estas sukcesplene disvolviĝinta. Se doloroj ĝin pikas kelkfoje, se disputoj okazas, mi ne tro ektimu: kreskanta organizo ĉiam sentas kraketi la ostojn, doloroj devenantaj el evoluo ne estas mortigaj, sed sanigaj. Bona volo ĉiuflanka, pacienco reciproka, toleremo kaj kompreno de la neceseco de komuna agado sukcesos venki la malfacilaĵojn. Ekster dubo estas ĉiuokaze la fakto, ke SAT grandiĝis kaj ke ĝia influo en la esperantista movado laborista konsiderinde kreskis. Per la agado de SAT, per ĝiaj servoj kaj kongresoj, esperanto pli kaj pli fariĝis konata al la diversaj laboristaj organizoj. Niaj membroj pli ofte ol antaŭe devas respondi al kontraŭdiroj, duboj kaj hezitoj de respondecaj gvidantoj de la laborista movado. Nia programo devas al ili liveri argumentojn, ilin ebligi, montri al tiuj gvidantoj, ke nia movado ne estas utopieca, iluzia, ridinda ludado, sed serioza, efika armilo de la Proletaro en ĝia batalado por klasa liberigo, por alproksimigo de la popoloj, por kultura supreniro.

Programo estas, krom tio, trafega rimedo por streki netan separlinion inter ni kaj la burĝa esperanto-movado, por ellabori niajn principojn per plej tranĉa klareco. Tio helpos al ni unuflanke detrui antaŭjuĝojn de laboristaj organizoj, kiuj ofte havante antaŭ la okuloj la burĝan esperanto-movadon, konsideras esperanton kiel burĝa ludaĵo, malutila al la Proletaro, ĉar ĝin deturnanta de klasbatalo. Aliflanke, tio permesos al ni prezenti al amikoj kaj kontraŭuloj la fundamenton de nia movado, tiel malsama je la burĝa esperantismo.

La programo nin ebligus montri kaj proklami, ke *nur* nia movado reprezentas la estonton de la lingvo universala, ke tia lingvo povas venki nur en la manoj (aŭ pli bone en la buŝo) de klaso, kies interesoj estas efektive internaciaj; de klaso kiu portas la ŝlosilon de la nova mondo; de la sola klaso kiu kapablas savi la kulturtrezorojn de la nuntempo el la hodiaŭa ĥaoso por la estonta homaro.

Finfine, programo kiun akceptus la granda plejmulto aŭ la tuteco de la SAT-anoj, estus garantio por sukcesplena kaj harmonia kunlaborado de ĉiuj proletaj esperantistoj klaskonsciaj en unu organizo. Precize montrante la celojn de nia movado, ĝi pli bone ol ĝis nun ebligus kunigon de tiuj fortoj por la fiksitaj celoj, eksigante el la kadro de SAT disputojn pri demandoj, kiuj ne apartenas al la solvotaĵoj de nia movado kaj kiuj povas kaŭzi malpaciĝon inter nia anaro.

Tiel la programo estus samtempe disigilo, rilate al la burĝa esperanto-movado, kaj kunligilo, rilate la diversajn proletajn tendencojn, firma fundamento de nia movado, montranta, ke esperanto estas pli ol simpla hazardo, sed historie necesa aperaĵo. Ĝi estus tiamaniere tre utila por la estonta disvolviĝo, efika laboro kaj prosperado de SAT.

Lucien Révo.

*

La aspekto de la programo

En nia antaŭa artikolo, ni demandis ĉu kaj kial SAT bezonas programon, kaj ni jesis la demandon per diversaj argumentoj.

Estas nun necese, diri kelke da vortoj pri la aspekto de la programo. La programprojekto aperigita en n-ro 78 kaj nun represita konsistas el tri partoj. La unua montras la historian necesecon de lingvo universala, la dua analizas la rilatojn inter lingvo universala kaj la laborista klaso, kaj la tria klarigas detale la celojn de SAT.

Certgrade tiu programo estas simila al la programoj de la plejmulto da proletaj partioj. La unua parto de tiuj programoj donas ĝenerale analizon de la tendencoj agantaj en la nuntempa socio, montrante, ke socialismo estas la fatala, neevitebla rezulto de tiu evoluo; la dua parto citas la postulojn, por kiuj la partio batalas jam antaŭ atingo de la fincelo, de l' socialismo, ekz. ĝenerala balotrajto, demokratigo de la konstitucio, sociaj leĝoj ktp. Klasika ekzemplo de tia programo estas la malnova programo de la Socialdemokrata Partio Germania (Erfurt 1892).

La programprojekto de SAT estas konstruita laŭ la sama skemo. La du unuaj partoj montras, ke lingvo universala estas fatala produkto de nia epoko kaj ke ĝi povas fintriumfi nur en la manoj de la Proletaro. La tria parto citas la celojn, por kiuj ni efike povas batali jam nun, antaŭ ĝenerala akcepto de esperanto.

La unua ĉapitro de la unua parto montras, ke lingvo universala estas rezulto de la kapitalista ekonomio. Nur dank' al la kreo de mondkomerco, de plej densaj rilatoj internaciaj, ebligitaj nur de la kapitalista produktadordo, de ĝia etendiĝo super la tutan teron, de la disvolviĝo de ĉiaj komunikiloj kaj transportiloj, de la enradikiĝo de kapitalismo en ĉiuj partoj de la mondo, povis disvolviĝi neceseco kaj bezono de lingvo universala. Kamparanoj vivas ĉiam sur aŭ proksime de la terpeco kiun ili kulturas, longaj vojaĝoj aŭ intima kontrakto kun aliaj nacioj ne estas ilia kutimo. La kapitalismo deŝiras la kamparanojn de la tero kaj faras el ili proletojn senhejmajn, kiujn nenia intereso kaj nenia gepatra tradicio katenas al unu loko.

Dank' al la ŝanĝo de la socia strukturo dormantaj popoloj vekiĝas kaj komencas partopreni la internacian vivon ekonomian, kulturan ktp.

La kapitalismo havas do kelkajn efikojn sur la vivon de la popoloj: 1. ĝi deŝiras la popolojn de la tero kaj intermiksas ilin pli forte ol iam antaŭe en alia epoko, per kreo de mondkomerco, de tutmonda ekonomio, kaj de potencaj interkomunikiloj; 2. ĝi plimultigas la nombron de la popoloj partoprenantaj la kulturan vivon internacian kaj malebligas pli kaj pli la uzon de malgranda nombro da lingvoj por internaciaj rilatoj; 3. ĝi levas la kulturnivelon de la laboristaj masoj tiugrade, ke la nombro da individuoj partoprenantaj la internacian vivon kreskas tiom, ke la lernado de unu aŭ pluraj fremdaj lingvoj fariĝas pli kaj pli sentebla perdo de tempo por grandiĝanta nombro, por tute nesufiĉaj celoj.

La dua ĉapitro de la unua parto klarigas la necesecon de lingvo universala por la Laboristaro. Ĝi montras la internaciajn interesojn de la proleta klaso kaj substrekas, ke la Laboristaro bezonas lingvon universalan multe pli urĝe ol la burĝaro.

La tria ĉapitro de la unua parto montras, ke esperanto estas la rezultaĵo de la tendencoj karakterizataj en la du antaŭaj ĉapitroj, ke ĝi estas la praktika solvo de la mondlingva problemo.

Tio nature ne signifas, ke esperanto, tia kia ĝi estas hodiaŭ, devas esti la lingvo de la liberigita homaro de la nova estonta socio, kiun ni mem ne plu vidos, sed kies unuaj komencoj kaj radikoj estas jam nun videblaj. La eniro de novaj popoloj en la internacian civilizon certe modifos ankoraŭ konsiderinde la mondlingvon de l' estonto. Esperanto estas bazita sur malgranda nombro da lingvoj, kiuj estis je la epoko de D-ro Zamenhof la solaj nacioj de kapitalista kulturo. Sed la vekiĝo de l' Oriento, la signoj de kreskanta sendependeco de la koloniaj popoloj plilarĝigas la nombron de nacioj, partoprenantaj la internacian kulturan vivon, vastege ekster la mallarĝan kadron de la eŭropaj lingvoj, sur kiu estas konstruita esperanto.

Ĉu tio signifas, ke ni devas forlasi esperanton kaj atendi en angulo dum unu aŭ du generacioj ĝis kiam la elementoj de nova lingvo universala sur pli larĝa bazo estus kreitaj?

Tute ne. Tia sintenado signifus imiti la vanajn, senfruktajn spekulaciojn de la idistoj kaj de aliaj "mondlingvanoj" kiuj eĉ ne scias paroli sian propran lingvon.

Esperanto certe ne estas *la* mondlingvo de la estonto; sed ĝi estas la kadro, sur kiu kaj en kiu disvolviĝos la lingvo estonta, per absorbo de ĉiuj novaj kulturelementoj. Esperanto povas konduki al la mondlingvo de l' estonto nur se ni ĝin konstante aplikas kaj uzas, sed ne per laboratoria spekulaciado senpraktika.

Ĉu eble valorus aldoni du aŭ tri frazojn tiusencajn al la tria ĉapitro de la 1-a parto de la programprojekto? *Lucien Revo.*

*

DISKUTEJO

NIA OPINIO

Pri la enstatutigo de "SAT-grupoj"

Niaj konsideroj estas la jenaj:

1. Ĉu necesas ĉiuloke, kie troviĝas kelkaj SAT-anoj, organizi ilin en la SAT-grupojn? *Jes,* SAT-anoj devas ĉiuloke aparte organiziĝi por: varbado al SAT, plenumado de praktika, peresperanta (servoj, korespondado, tradukado de artikoloj ktp.), kaj eduka (raportoj, lekcioj, diskutoj, legadoj ktp.) SAT-ana, sennacieca laboro. Tiu bezono de organiziĝo tiom klare evidentiĝis por multaj SAT-anoj, ke novaj grupoj, dum la lastaj 7—8 monatoj, amase aperas kaj kreskas en multaj lokoj, vere "kiel fungoj post pluvo!.." (Rig. la Kronikon de *preskaŭ ĉiu n-o de S-ulo!)*

Ni aldonu, ke la sperto de dujara agado de nia Ĉita'a SAT-grupo, klare montris al ni, kiom valora estas por SAT-afero la kuniĝo en grupon kaj komuna organizita praktika laboro kaj edukiĝo!

2. Ĉu jam venis tempo por oficialigo de SAT-grupoj, por enmeto en SAT-statuton de la artikoloj pri ili? Ankaŭ al tio ni respondas: *jes!* La aperado de SAT-grupoj lastatempe fariĝis *tiom amasa*, kaj kreado de la SAT-grupoj estas afero *tiom grava*, ke nia statuto *ne devas* resti seneĥa, kaj prisilenti tiujn novajn organojn de SAT. Male, per enmeto en SAT-statuton de artikoloj pri SAT-

grupoj, *ni devas atentigi ĉiujn pri ili,* kaj instigi la SAT-anaron organizi ilin ĉiuloke, kie estas eble, kaj kie ili ankoraŭ ne estas organizitaj.

La artikoloj en la Statuto ankaŭ klare montros por ĉiuj la plej bonajn organizformojn de la SAT-grupoj kaj la plej ĝustan enhavon de ilia laboro, ĝuste tion, kio ĝis nun por multaj estas ne klara, kaj pri kio regas granda diverseco de opinioj kaj de agmanieroj en la SAT-rondoj.

3. Ĉu devas la SAT-grupoj en sia agado kunigi la per- kaj por-esperantan (propagandan) laboron? Sendube, parolante principe, ni devas diri: *ne devas!* Nia SAT, pure praktika per-esperanta organizo, ankaŭ en siaj lokaj organoj, *devas resti pure praktika, per-esperanta... Same, kiel ĉie en* SAT, ankaŭ en la grupoj, esperanto ne devas esti instruata aŭ propagandata, sed *nur* praktike utiligata. Tial ni akre kontraŭas la proponon pri "SAT-sekcioj" de Gek-doj el Bruxelles, presitan en "S-ulo" n-o 95 (22. VII. 26, pĝ. 6). Tio estas "principe"! Sed certe, *fakte* iufoje okazas, ke SAT-grupoj tamen okupas sin per propagando kaj instruado de esperanto (precipe tio okazas tie, kie ne ekzistas propagandaj asocioj aŭ grupoj). Nu kion do fari?.. Ni esperas, ke tio estas almenaŭ *provizora* kaj *"flanka"* sinokupo de la SAT-grupoj. Sed certe, *neniaokaze* oni devas perstatute konfirmi la esperantan propagandan agadon de la SAT-grupoj.

4. Kiel oni devas nomi la lokajn organizojn de SAT-anoj? Estas prefere nomi ilin "SAT-grupoj", sed ne "SAT-sekcioj", kiel proponas la Gek-doj el Bruxelles, ĉar la nomo "Sekcioj" estas donata en SAT al tutmondaj fakorganizoj de SAT, kiel ekz. "Milit-Sekcio", "Junular-Sekcio", "Vegetarana Sekcio", ktp., krome la nomo "Sekcio" entenas en si ian komprenon pri nememstareco, fakeco de ĉi organizo, kio ne konvenas al organizaj formoj, kaj enhavo de laboro de la SAT-grupo, proponataj de ni.

5. Ĉu oni povas devigi organizon de la grupoj ĉiuloke kaj aliĝon al ili de senescepte ĉiuj SAT-anoj (tiuloke, kie grupoj ekzistas)? Ne, sendube *oni ne povas devigi* organizi SAT-grupojn en ĉiuj lokoj *senescepte,* kie troviĝas ne malpli ol 3 SAT-anoj, ĉar la cirkonstancoj (la blanka teroro, persekutoj, trookupiteco de ĉiuj SAT-anoj en iu loko, ktp.) en multaj lokoj ankoraŭ *malpermesas* tion fari. Ankaŭ oni ne povas devigi *senescepte ĉiujn Gek-dojn* aliĝi al organizitaj grupoj, ĉar ankoraŭ al multaj Gek-doj la vivo *malpermesas* tion fari (trookupiteco, persekutoj de la polico ktp.). Ĝuste pro ĉi konsideroj ni proponas *nur laŭeble* fondi la grupojn, kaj *nur laŭeble* aliĝi al ili. Ne plu!

6. Kun kia kvanto da SAT-anoj oni povas komenci la organizon de la SAT-grupo? Ni opinias, ke en multaj lokoj, kie estas ankoraŭ *nur* tri aktivaj membroj de SAT, ili jam *povas* kuniĝi en la SAT-grupon, kaj komenci la organizitan per-esperantan agadon. Do, sendube oni devas al ili tion *permesi!* Certe en iuj aliaj lokoj, eĉ kun pli granda nombro da SAT-anoj, oni eble ne povas ankoraŭ organizi la SAT-grupojn... Nu, sed tio ja ne signifas, ke oni devas malpermesi kuniĝi eĉ al 3 Gek-doj, tie kie ili povas kaj volas tion fari. Jen kial ni proponas la 3 membran minimuman nivelon por la SAT-grupoj.

7. Ĉu oni povas doni al SAT-grupoj rajtojn esti oficiale reprezentitaj ĉe la kongresoj, kaj memstare akcepti la membrojn? Ĝuste tion proponas la Gek-doj el Bruxelles en sia propono pri *"SAT-sekcioj"*. Sed ni opinias, ke ili malpravas. Ja estas sendube, ke oni ne povas ankoraŭ doni al la SAT-grupoj la similajn rajtojn, kiel ekz. al partiaj ĉeloj, ĉar ja oni ne forgesu, ke ankoraŭ *ne ĉie* oni povas organizi la grupojn, kaj ankoraŭ *ne ĉiuj* povas aliĝi al la grupoj. Tial la kongresanoj povas voĉdoni ankoraŭ *nur* je sia propra nomo, kaj *nur* la Administranto de SAT povas ankoraŭ akcepti la kotizojn kaj liveri la SAT-matrikulojn al la SAT-anoj. Niaj grupoj estu ankoraŭ ne plenrajtaj!

8. Kiajn do rajtojn oni povas doni al la SAT-grupoj? Sendube, la grupo rajtas elekti sian propran estraron (respondecan Sekretarion, aŭ Sekretariaron), kaj ankaŭ la lokan SAT-peranton.

Al la lasta ni opinias necesa doni la rajton esti *sola* reprezentanto de SAT-administracio en lia loko, t. e. ke *nur* pere de li oni povu pagi la kotizojn kaj abonojn al SAT (por tiel plifaciligi la laboron de administranto).

Jen kia estas nia opinio pri kreo kaj pri enstatutigo de la SAT-grupoj kaj pri diversaj kondiĉoj de ilia agado. Pri la ceteraj detaloj vidu la proponon n-o 1. Konklude ni esperas, ke *ĉiuj* Gek-doj serioze pripensos ĉi problemojn, kaj ke ankaŭ ĉe la kongreso ĝi estos dece pridiskutita. Ja estas tre grave kunagadi organizite, kuniĝi en grupojn por la Sennacieca mem-edukado, pliperfektiĝo, praktika laboro... *Nur* kunagante komune, ni sukcesos dece plenumadi niajn taskojn, t. e. bone servi al esperanto kaj al la Proletaro tutmonda!

Unuanime akceptita ĉe la kunsido de *Ĉita'a SAT-grupo* (12-a sektoro), la 3. IV. 1927.

Sekretario de SAT-grupo:
K. Fade (3717).

*

PROPONO N-o 1
pri enstatutigo de "SAT-grupoj"

Ĉita'a SAT-grupo proponas fari la jenajn ŝanĝojn en *la Statuto de SAT:*

a) En la nunan Artikolon 4-an enmeti:

"Ĉiuj *aktivaj* membroj de SAT rajtas:

ĉ) aliĝi al lokaj SAT-grupoj kaj partopreni ilian laboron.

Ĉiuj *aktivaj* membroj de SAT devas:

d) se al ili estas eble, aliĝi al lokaj SAT-grupoj kaj partopreni ilian laboron."

Tiamaniere la nuna punkto d) de § 4, estu nomita: punkto e).

b) Ŝanĝi la nunan Artikolon 6-an jene:

"La pasiva membro ricevas specialan kotizmarkon, povas uzi la ĝeneralajn servojn de la asocio, partopreni la laboron de la loka SAT-grupo, sed li rajtas nek partopreni ian voĉdonon, nek eniĝi ian organon asocian, aŭ grupan."

c) Ŝanĝi la lastan frazon, de la nuna Artikolo 7-a, jene:

"En lokoj, kie estas lokaj SAT-perantoj, oni povas aliĝi al SAT *nur* pere de ili."

ĉ) Al la nuna Artikolo 9-a aldoni:

"Lokaj organoj de la Asocio estas: lokaj SAT-grupoj".

d) Ŝanĝi la unuan frazon de la nuna Artikolo 23-a jene:

"La E. K. rajtas en ĉiu loko, kie ne ekzistas loka SAT-grupo, elekti perantton, aŭ reprezentanton kun limigita mandato."

e) Aldoni al SAT-statuto la jenan novan ĉapitron:

Lokaj SAT-grupoj

1. En ĉiuj lokoj, kie estas eble, kaj kie troviĝas ne malpli ol tri aktivaj membroj de SAT, ili grupiĝu en t. n. *lokajn SAT-grupojn.*

2. *Taskoj* de lokaj SAT-grupoj estas: organizita plenumado de SAT-servoj, senaciec-karaktera edukado de la grupanoj, varbado al SAT, kaj ĝenerale, agado surbaze de ĉi statuto kaj de la decidoj de la III-a SAT-kongreso (punkto 3-a de la gvidrezolucio).

3. La nombro kaj la konsisto de la grupo-estraro estas difinataj de la grupo mem; tamen ĉiuokaze, en ĉiuj grupoj *nepre* devas esti elektataj:

a) *La respondeca Sekretario* (aŭ Sekretariaro) de la grupo, kies taskoj estas: gvidi la funkciadon de la grupo, prizorgi la protokoladon de la kunsidoj, la statistikadon de grupanoj ktp.

b) *La loka Peranto,* kies taskoj estas: perado de SAT-kotizoj kaj abonoj, gvidado de plenumado de la servoj (laŭ kondiĉoj de artikoloj 34, 35, 36) ktp.

4. La loka kotizo estas starigata, kaj ĝia sumo estas difinata de la grupo mem. Tamen *neniaokaze* ĝi povas esti deprenata el la regula SAT-kotizo, sendata al Administranto de SAT.

* * *

Ĉiuj partoj de la propono estas *bone akorditaj inter si.* Kaj tial la kongreso estas petata: aŭ entute akcepti la proponon, aŭ plene rifuzi ĝin, sed ne akceptadi parte, per kio estos disigita harmonio en la propono.

Klarigojn pri ĉi propono vidu en artikolo *"Nia opinio..."* ĉi sube presita.

La propono estis unuanime akceptita ĉe la kunsido de *Ĉita'a SAT-grupo* (12-a sektoro) la 3. IV. 1927 j.

Sekretario de l' SAT-grupo:
K. Fade, (3717).

*

FERA GVARDIO DE SAT

(Fantastika romano, verkata de fantaziemaj SAT-anoj.)
(Daŭrigo.)

Entuziasmo inter SAT-anoj pli kaj pli disvastiĝadis.

El marĉoj, minoj, kavoj kaj ceteraj profundaĵoj eksonis obtusaj voĉoj:

"Al ĉielo! Al ĉielo!"

Seriozemuloj ridetis kaj diris: "Vana entrepreno! Se piuloj ne povis konstrui la turon, kion do povos fari mizeraj diabloj, disĵetitaj diversloke sub tero? Ili eĉ ne povas vidi unu la alian."

Sed jen elrompis unu, jen alia... entute jam 6! — (Daŭrigota.) *(5099.)*

*

El la lando de la pendigiloj mi sendas 75 lv. (2.30 g. m.) — kotizaĵon por la pasintaj monatoj de 1927 j.

Mi promesas sendadi almenaŭ dum 5 jaroj — je la fino de ĉiu monato 15 levojn. La iniciato de K-do Fjodorov estas nepre subteninda. *Atalsad (Bulgario) 4079.*

*

Vivu Fera gvardio de SAT!

Mi anoncas mian aliĝon al la Fera gvardio, ĉar mi estas same infektita per ĉi-ideo. Mi sendas mian ½ jaran kotizon — 6 rubl.

V. Lebedev, Ivanovo-Voznesensk, (4696).

Nicollet (Lyon) mia maja briko 0,5 dol.

Fedotov (Ŝaĥty) mia maja briko 1 rubl.

*

NIA POŜTO

Multaj K-doj sendas al ni fotojn, kiuj rilatas la rubrikon "Tra Esperantio". Ni absolute ne povas publikigi ilin. Oni ne forgesu, ke "S-ulo" celas *ĉefe* apliki la lingvon k. ne propagandi ĝin. Nur en kelkaj esceptaj okazoj (ekz. kongreso de grava esp. organizo) ni povas publikigi fotojn pri la esp. movado. *E. L.*

La Lingva Angulo

Demandoj:

1 Mi ŝatus, ke oni klarigu la sencon de la vortoj: "kara" kaj "malkara". Multfoje mi legis en "S-ulo": "la prezo estas malkara" aŭ 'S-ulo' estas la malpli kara gazeto". Ankaŭ al anoj de diversaj grupoj ne plaĉas tia uzo de l' vortoj. Mia opinio estas, ke la prezoj devus esti "moderaj" aŭ "malaltaj". Nur la varoj povas esti malkaraj. En vortaroj ankaŭ oni trovas la vorton "malkara" en la aludita senco. Ĉu "modera" ne estas pli korekta? — 3831.

2. En "Fundamento de Esperanto" Zamenhof instruas jene: "Resti kun leono estas danĝerE, sed en "S-ulo" oni povas legi: "Estas danĝerA, diris Paskal, tro montri al la homoj..."[1]). Nu, la redaktoro fanfaronas, kiam li asertas, ke li redaktas nian gazeton en tute Zamenhofa stilo. Mi ŝatus koni la opinion de Fakulo pri tio. Zoilo.

Respondoj:

1. Ĉar KARA signifas "de alta prezo, kiu multe kostas" kaj ĉar KARECO signifas "alta prezo", estas evidente, ke ia PREZO ne povas esti MALKARA, sed nur MALALTA aŭ MODERA. Tamen tiu neĝusta uzo de la vorto MALKARA, kiu povas naski neniun konfuzon, ŝajnas al mi ne tre grava. Mi mem neniam uzis, nek uzas, nek uzos ĝin, kaj mi neniam neniom konsilos ĝin; tamen mi ne estas tiel severa, kiel vi.

2. Responde mi opinias, I., ke la redaktoro prave rajtas aserti, ke li estas unu el la malmultaj esperantistoj, kiuj plej bone scipovas la lingvon kaj plej korekte uzas ĝin; II., ke vi estas malprava pretendante, ke estas malkorekta kaj kontraŭzamenhofa la uzado de la adjektiva finiĝo en la citita frazo.

Efektive Zamenhofa estas kaj kontraŭzamenhofa ne povas esti ia dirmaniero, kiun Zamenhof mem dum longa tempo uzadis kaj pri kies taŭgeco aŭ netaŭgeco li estis tiel necerta kaj ŝanceliĝema, ke li daŭrigis ankoraŭ kelkfoje uzi ĝin, eĉ post kiam li estis deklarinta sian preferon por alia formo. Ekzemple oni trovas en HAMLETO: "Plej bonA estos, se vi ĝin forgesos" (I, 5), kaj (V, 2) "Ĉu ne estas eblA, ke ni kompreniĝadu per ia alia lingvo?". En privata letero, citita de s-ro Reiner, li diras: "La plej bonA estus, silenti pri ili." En la Fundamenta KRESTOMATIO Zamenhof ankaŭ skribis en la jaro 1903 kaj lasis nekorektita en ĉiuj postaj eldonoj, kiujn li reviziis: "La gazetoj ordinare ne trovas necesA eniĝi en tion, pri kio ili skribas." (p. 301). Fine, oni legas en la solena BULONJA DEKLARACIO, redaktita de Zamenhof mem: "Ni subskribintoj trovis necesA doni la sekvantan klarigon."

Bonvolu plie rimarki, ke la de vi kritikita dirmaniero estas ofte kaj prefere uzita de aŭtoritataj eminentaj esperantistoj, kiel s-ro Boirac, antaŭa Prezidanto de la *Lingva Komitato* kaj de la *Akademio*, s-ro Grosjean-Maupin, k. c. Vi kredeble ne scias, ke jam antaŭ longe tre kompetentaj esperantistoj atentigis, ke la uzado de la adjektiva finiĝo, kiam la predikato rilatas al infinitivo aŭ al membro de frazo, estas multe pli logika kaj pli klara, kaj ke la tiea uzado de la adverba finiĝo, "eĉ kiam ĝi ne estas dusenca aŭ kontraŭsenca" (L. I. dec. 1909), estas tamen lingva naciaĵo, kiu tute konsternas la lingvajn kutimojn de ĉiuj latinidaj lingvanoj. Ĉu tio estas necesa, ke mi citu ekzemplojn por montri al vi, ke, kun kelkaj radikoj, kiel EBL', EFEKTIV', NECES', k. c., la uzado de la adverba formo estas konfuziga? Tia formo ankaŭ naskas dusencecon ĉiufoje, (kio ofte okazas), kiam la adverbforma predikato estas modifata per vera adverbo. Ekzemple: "Estas vere necese, perfekte eble, ĝuste domaĝe, eble eble, ktp."

Uzu do, se tio plaĉas al vi, la duan, tute korektan, zamenhofan esprimmanieron, sed ne kondamnu la unuan, egale korektan. Memoru tion, kion konstante ripetis nia Majstro: "Ni ne tromultigu la regulojn, ni ne rigidigu nian lingvon... La diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke dum en la unua oni devas uzi *nur* tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan." (ZAMENHOF, LINGVAJ RESPONDOJ, pĝ. 26. Revuo, dec. 1906). *Fakulo.*

[1]) La citita frazo troviĝas en n-ro 125—126 de "S-ulo" (19-2-27).

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

Le Libéré, Nice, 30. 4. 27: "El Ĉinio". — *L' Effort,* Lyon, 1. 5. 27: "El Polio", "El Svedio", "Mekanikaj fortoj en la mondo", 15. 4. 27: "Stato de Junlab. en Jugoslavio", "Trustoj en la Britia Industrio", "El Hispania vivo". — *La Flamme,* Saint-Etienne, 9. 4. 27: "Sklavkomerco en Abisenio". — *Le Sindiqué du centre,* Bourges, apr. 27: "Salajroj en Estonio". — *The Worker's Weekly,* Sydney, 4. 3. 27: "Blankaj mastroj, flavaj sklavoj". — *The Shop Assistant,* Londono, 7. 5. 27: "Kreo de kooperacia kultura centro en Parizo". — *Krasnojarskij Raboĉij,* Krasnojarsk, 22. 3. 27: "Blankaj mastroj, flavaj sklavoj". — *Zarja Vostoka,* Tiflis, 29. 3. 27: "Sindikata movado en Egiptio" (nek "S-ulo", nek esperanto menciitaj!). —

Enhavas notojn pri SAT.

Bournemouth Daily Echo, Bournemouth, 9. 5. 27. — *Der Wille,* Hagen, okt. 26 (VI. SAT-kongreso). — *Kiir,* Laupäewal, 30. 4. 27 (kelkaj artikoloj subskribitaj per esperantaj pseŭdonimoj. — *La Rejna Stelo,* Strasburgo, majo 27. — *Le Cri du peuple,* Nimes, 1. 5. 27 (VII. SAT-kongreso). — *L' Effort,* Lyon, 1. 5. 27 (samo). —

Enhavas tradukojn el esperantaj leteroj.

Za Mir i Trud, Rostov na Donu, 29. 4. 27 k. 1. 5. 27. — *Kransnaja Zvezda,* Moskvo, 1. 5. 27. — *Molot,* Rostov na Donu, 5. 5. 27. — *Bilŝoviĉenjata,* Kievo, 25. 4. 27 (Letero kaj foto de germ. pioniroj). — *Niĵegorodskij Rabselkor,* Niĵni Novgorod, 15. 4. 27 (letero el Bulgario, nenie menciite, ke trad. el esp.). — *Ruhr-Echo,* Essen, 21. 4. 27 (salutoj de sovetiaj laboristoj). — *Neue Zeitung,* München, 1. 5. 27 (salutoj de sovetiaj fervojistoj). — *Zvezda,* Perm, 14. 4. 27 (de germ. kaj svedia metalistoj, sciigo pri komenco de ŝakludo kun germ. laboristoj). — *Zarja Vostoka,* Tiflis, 30. 3. 27 (5 leteroj). — *Sächsische Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 30. 4. 27, 2. 5. 27 (unua-majaj salutoj), 12. 5. 27 (du leteroj).

Enhavas priesperantajn artikolojn.

Putj Rabselkora, Rostov na Donu, 15. 4. 27. — *Sovetskij Jug,* Rostov na Donu, 29. 4. 27. — *Molot,* Rostov na Donu, 5. 5. 27. — *The Wheatsheaf,* jan. 27. — *Bournemouth Times,* Bournemouth, 29. 1. 27, 5. 2. 27, 12. 2. 27, 26. 2. 27 (artikolaro pri esperanto en lernejoj). — *Veĉernij Kiev,* Kievo, 20. 4. 27. — *Signalen,* Torsdagen (konstanta fako "Esperanto"). — *Le Drapeaux Rouge,* Bruselo, 21. 4. 27 (pri Zamenhofaj festoj en Varsovio kun foto). — *Sächsische Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 14. 4. 27, 16. 4. 27, 19. 4. 27 (Eksterordinara LEA-kunveno), 3. 5. 27 (Laborista sportkunveno en Helsinski).

Enhavas enesperantajn artikolojn.

Der Wille, Hagen, dec. 26. (Alvokoj de la mondjunularo). — *The Labour Woman,* Londono, 1. 5. 27 (Du leteroj el Ĉekoslovakio). —

★ DIVERSAĴOJ ★

SAT-FOTO-SERVO

Ĉu ni ne povas ĝin organizi? Sendu fotojn, PK ilustritajn pri moroj kaj kutimoj en via lando ankaŭ pri gravaj okazintaĵoj en via lando kaj skribu kiajn fotojn vi deziras ricevi. Do same ni organizos la SAT-Foto-Interŝanĝoficejon: Sendu: Minsk, Poŝtkesto 33 Dim. Sneĵko.

*

PER KEŁKAJ VORTOJ

* Ĵus estas eldonitaj la oficialaj propagandaj olimpiadaj afiŝoj kun esp. teksto(belaj kolorbildoj) kaj estas senpage mendeblaj ĉe K-do E. Hloupy, Praha VII, Štitného 958, tie vi ankaŭ povas ricevi la pli detalan programon de esp. aranĝaĵoj. *(4370.)*

Ĉiuj Ateistoj

legu la ĵurnalon

LIBERPENSULO

Per abono de ĉi gazeto vi estas membro de la "Internacia Ligo de Liberpensuloj". Kotizo 2.— mk. g. aŭ sama valoro. Ĉiu novaliĝonto ricevas diversajn interesajn malnovajn numerojn senpage. Ĉiu membro rajtas publikigi trilinian anoncon jare, senpage. USSR-anoj mendu ĉe K-do Geo Teterin, Gubkom Esperantistov, Leningrad, Fontanka 21.

Adreso: **Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22, I.**

Poŝtĉek-no. 43808.

INSTRUISTO KAJ EDZINO

Dezirante viziti Danzigon kaj Varsovion en julio, volas korespondi kun esp-istoj tieaj.

Adreso: *John Wilkie, 65, Braeside Street, Glasgow NW. (Scotland.)*

K-do A. K. Savostianov,

Saratov, Igor, Poŝta kesto 45, Sovetio

Ĵurnalisto. 32-jara, esperant. depost 1910, leg. ankaŭ la lingv. germ., franc., angl., italan, — post longdaŭra malfac. malsano dez. rekom. interkoresp. kun viglaj kaj serioz-skribemaj Gek-doj el ĉ. l. Dez. amike interrilat. kun ĉ. gelabor. intelektuloj k. a. interes. pri literaturo, politikaj, soc., ekonom. probl. Interŝanĝ. nacilingv. librojn, rev. gazet. Garantias resp., sed ne ĉiam baldaŭan.

Por naturamika domo!

Du belajn PI bfl ni sendos al ĉiu, kiu helpos al ni ornami memkonstruitan Naturamiko-domon, per sendado de interesaj naturbelaĵaj PI bfl (ne skribu bfln). Gek-doj el ĉ. l. prisalutu ĝian inaŭguron 17. de julio, laŭeble kun stampilo de simpatia kulturorganizo.

Nat. Esp. sekcio. SAT-ano *2429* Gl.

Adr.: *T. V. Naturfreunde F'felder Hof, Esslingen a. Neckar* (Germ.)

*

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)